

Propono pri la solvo de la lingva problemo ĉe UN
Claude Gacond, 168-a radioprelego, 1966.12.28 & 1966.12.31

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintan monaton delegacio de Universala Esperanto-Asocio transdonis al la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj la Proponon pri la solvo de la lingva problemo.

A.- Tiu propono rikoltis preskaŭ unu milionon da subskriboj.

Cl.- Jen la oficialaj ciferoj, laŭ la statistikoj faritaj en oktobro : 920'954 individuaj subskriboj apogis tiun proponon, kaj 3'843 alportis la pezon de pli ol 71 milionoj da kolektivaj membroj.

A.- Do tiu ondo da subskriboj per kreskanta forto pravas, ke la ondo, kiu devigis Uneskon akcepti la Deklaracion de 1954, ne estis eksterordinara fenomeno.

Cl.- Regule, kaj ĉiam pli forte, la maro Esperantujo ĵetos siajn ondojn kontraŭ la Palaco Mahattan, ĝis kiam la funkciuloj en tiu babela ĉielskrapulo ekpraktikos nian lingvon por eviti morti sub foliaroj de subskriboj poresperantaj.

A.- Nun ili dronas sub amaso da tradukotaj dokumentoj. La prezo, kiun la homaro devas pagi pro la multlingveco en la nuntempaj kondiĉoj, estas grandega. Laŭ la dokumentoj publikigitaj antaŭ nelonge de la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj mem, la kostoj por la tradukado kaj interpretado en Unuiĝintaj Nacioj estas vere ŝokaj. Sufiĉas memori, ke la kostoj de tradukado kaj interpretado por nur unu Sesio de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN atingis preskaŭ duonon de miliono da dolaroj.

Cl.- En tiaj kondiĉoj, diris Ivo Lapenna, la prezidanto de la UEA-delegacio, la lingva problemo fariĝas brulanta kaj urĝe solvenda per la sole ebla solvo, nome per la Lingvo internacia.

A.- La Delegacio de UEA estis akceptita de sinjoro Chakravarthi Narasimhan, vic-sekretario kaj ĉefo de la kabineto de la Ĝenerala sekretario de UN U Thant.

Cl.- Sinjoro Lapenna donis klarigojn pri la aktuala disvastiĝo de nia lingvo kaj menciis, ke inter la subskribintoj de la Propono troviĝas 114 membroj de registaroj kaj unu ŝtatestro, 1'359 parlamentanoj, 995 lingvistoj kaj filologoj, 6'932 membroj de akademioj aŭ profesoroj en universitatoj, preskaŭ 52'000 profesoroj kaj instruistoj.

A.- Laŭ nia scio tiu Propono estas la plej granda kaj plej impona Propono iam ajn prezentita en la tuta kultura historio de la homaro al internacia instanco surbaze de privata iniciato.

Cl.- La UEA-delegacio transdonis al sinjoro Narasimhan jenajn dokumentojn : liston de la membroj de la delegacio ; liston de la transdonitaj dokumentoj ; 300 fotokopiojn lukse binditajn en formo de du grandaj ledaj dosieroj entenantaj ĉirkaŭ 1'500 subskribojn de la plej elstaraj unuopuloj kaj plej gravaj organizaĵoj ; liston de la menciitaj individuaj kaj kolektivaj subskribintoj ; statistikan resumon pri ĉiuj individuaj subskriboj kaj de ĉiuj organizaĵoj ; presitan Memorandon en la lingvoj angla, franca, hispana, rusa kaj esperanto kun diversaj aldonoj.

A.- La delegacio prezentis al sinjoro Narasimhan persone, ĉar li estas hindo, la verkon *Malsata Ŝtono* de Rabindranath Tagore, kiu aperis kiel unua publikaĵo en la Serio de UEA *Oriento-Okcidento*. Plue la delegacio transdonis po du ekzemplerojn de la verkoj *Dia Komedio* de Dante, *Zamenhof – Creator of Esperanto* de Marjorie Boulton kaj *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*. Unu kompleto de la tri verkoj estis por sinjoro Narasimhan, kaj la alia por U Thant.

Propono pri la solvo de la lingva problemo ĉe UN
Claude Gacond, 168-a radioprelego, 1966.12.28 & 1966.12.31

Cl.- Sekvis konversacio, dum kiu sinjoro Narasimhan diris interalie, ke la Ĝenerala Sekretario povas nenion iniciati rilate la Proponon. Nur se la Ĝenerala Asembleo farus iun decidon, laŭ propono de iu Ŝtato-Membro, favore al pritrakto de la afero, tiam la Sekretariato povus formi ian komisionon aŭ komitaton por esplori la demandon.

A.- Tiu akcepto de la 6-a de oktobro en la UN-Palaco estas nur la komenco de sistema agitado far UEA. En Nov-Jorko okazis multaj renkontoj inter Ivo Lapenna kaj ĵurnalistoj. Centoj da gazetartikoloj aperis en plej diversaj gazetoj, televidaj kaj radiaj disaŭdigoj ripetis plurfoje la intervjuojn. Fakaj kunvenoj okazis en universitataj medioj.

Cl.- Okaze de tiu kampanjo en Usono profesoro Lapenna estis invitita por prelegi en la Geolingvista Klubo de Novjorko. Membroj de tiu Klubo estas sciencistoj, kiuj okupiĝas pri la tre speciala temo de internacia komunikado kaj geografia disvastigiteco de unuopaj lingvoj, kio klarigas la nomon geolingvista de la Klubo. Pro la strikta specialeco – en tuta Usono nur sesdeko da lingvistoj okupiĝas pri ĝi – la publiko estis malgranda, sed ege elektita. Prezidanto de la Klubo estas profesoro Mario Pei.

A.- Ivo Lapenna parolis pri la nuna situacio de la Lingvo internacia en la mondo. El la sekvaj demandoj montriĝis ne nur, per kia profunda interesiĝo kaj scivolo oni aŭskultis nian reprezentanton, sed ankaŭ, ke oni plene akceptis liajn klarigojn.

Cl.- Profesoro Pei en siaj konkludaj vortoj atentigis, ke laŭ lia opinio la lingvoproblemo en la hodiaŭa mondo estas brulanta, ke neniu nacia lingvo povos doni kontentigan solvon por ĝi, sed ke nur internacia lingvo povos plenumi tiun bezonon. Preskaŭ ĉiusemajne li ricevas informojn kaj flugfoliojn pri iuj novaj projektoj de internacia lingvo. La kompilintoj petas lian opinion por povi poste utiligi lian nomon por sia propagando, sed al ĉiuj li donas la saman respondon, ke jam ekzistas lingvo plene funkcia, kaj ke do ĉiuj pliaj klopodoj estas nur perdo de tempo kaj mono.

A.- Okazis dua renkontiĝo inter la prezidanto de UEA kaj Mario Pei, dum kiu nia reprezentanto povis interŝanĝi ideojn kun la granda usona interlingvisto.

Cl.- Ni eble ne havu tro da iluzioj. Estos tre malfacile trudi nian lingvon en la UN-organizaĵon. Tamen la debatoj pri nia lingvo ne ankoraŭ silentis. Kiel okzaze de la pasinta subskriba ondo, tiu debato verŝajne daŭros plurajn jarojn. La kontraŭstaroj ĝis nun estis malpli publikaj. Tamen en la registaraj medioj reprezentantaj la grandajn naciojn, oni malfacile akceptos ekpraktiki lingvon, kiel la nian. Tamen la elspezoj por la tradukado tiom endanĝerigas la financojn de UN, ke eble pro ekonomiaj kaŭzoj oni devos malfermi pordeton al la esperantistoj.

A.- Poste la esperantistoj organizos novan kampanjon. Novaj ondoj sin ĵetos kontraŭ tiu Palaco, kie hodiaŭ decidiĝas grandparte la sorto de l' mondo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-